Friedrich Leopold Stolberg, Graf zu Stolberg-Stolberg,

## Al la naturo

*tradukita de Hans Erik Jensen*

Vi naturo, sankta, kara,
laŭ la vojo via klara
gvidu min per via mano,
estu do al ni ekrano.

Laca, kara amikino,
kuŝas mi ĉe via sino,
suĉas ĝojon plej ĉielan,
lulas min en dorman belan.

Amas mi vin kiel infano,
iras nur ĉe via mano
laŭ la vojo via klara,
vi naturo, sankta, kara!

...

Friedrich Leopold Stolberg, Graf zu Stolberg-Stolberg,

## Al la naturo

*tradukita de Manfred Retzlaff*

Dolĉa, sankta vi natur',
Iru mi sur via spur',
Gvidu min ĉe via man',
Kvazaŭ estus mi infan'!

Laciĝinte tiam mi
Sinkas al la brust', al vi,
Trinkas ĝojon de miel',
Estas mi en la ĉiel'.

Aĥ! Mi sentas bone min!
Ĉiam volas ami vin ;
Iru mi sur via spur',
Dolĉa, sankta vi natur'!

...

Friedrich Leopold Stolberg, Graf zu Stolberg-Stolberg,

## An die Natur

Süße, heilige Natur,
Lass mich gehn auf deiner Spur,
Leite mich an deiner Hand,
Wie ein Kind am Gängelband!

Wenn ich dann ermüdet bin,
Sink' ich dir am Busen hin,
Atme süße Himmelslust
Hangend an der Mutterbrust.

Ach! Wie wohl ist mir bei dir!
Will dich lieben für und für;
Lass mich gehn auf deiner Spur,
Süße, heilige Natur!

...

*Traduko de la Germana poemo "An die Natur" de* Friedrich Leopold Stolberg, Graf zu Stolberg-Stolberg *(∗1750-11-07 – †1819-12-05) en Esperanton de* Hans Erik Jensen *(†1973-06-18).*

*Arg-482-937 (2008-12-11 10:21:02)*

*Tiu ĉi Esperantigo de la poemo troviĝas en la kantlibro "Esperanto-Sangbogen", eldonita 1941 de Dana Esperanto-Asocio kaj Dansk Esperanto-Selskab, n-ro 27. S-ano Lars Kromann [Stenbryder-vej 6, Værløse, DK-4640 Fakse, lars.ev@get2net.de] transprenis ĝin en sian poem- kaj kant-kolekton "www.esperantonia.dk". Vidu la retejon* `http://www.esperantonia.dk/allanaturo.htm`.

*Traduko de la Germana poemo "An die Natur" de* Friedrich Leopold Stolberg, Graf zu Stolberg-Stolberg *(∗1750-11-07 – †1819-12-05) en Esperanton de* Manfred Retzlaff *(∗1938-11-04) en 2008-12-11.*

*MR-473-01 / Arg-482-936 (2008-12-12 21:06:50)*

*Por tiu ĉi poemo komponis muzikaĵon la germana komponisto Franz Schubert (1797 - 1828). Vidu la retejon* `http://www.klassika.info/Komponisten/Schubert/Lied/D_372`.

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* Friedrich Leopold Stolberg, Graf zu Stolberg-Stolberg *(∗1750-11-07 – †1819-12-05).*

*Arg-482-935 (2008-12-12 21:06:02)*

*Dies Gedicht ist von dem Komponisten Franz Schubert (1797 - 1828) im Jahre 1816 vertont worden. Siehe* `http://www.klassika.info/Komponisten/Schubert/Lied/D_372/`.